Prezo: 6 €
www.satesperanto.org
Julio-Aŭgusto 2022 | n-ro 07-08 (1405-1406)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# PERANTOJ

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete: fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo: 00-32- (0)71 644916
Rete: cglady@arcadis.be
Bankkonto: 750-6373051-18
IBAN: BE50 7506 3730 5118, BIC: AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Fetah Zvirac
Esada Pašalića 6
71000 Sarajevo
Bosna i Hercegovina
rete: fetahzvirac@gmail.com
tel. (poŝa): +387 (0)61 170 094
**Brazilo** – Fernando Pita,
Estrada Coronel Vieira, 134, Bl. 03 Ap. 402, Bairro Irajá
BR-21220-310 Rio de Janeiro
rete: magisterpita@gmail.com
tel: +55 21 98863-3854
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel.: +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT Sennacieca Asocio Tutmonda"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX
IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete: ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791, (poŝa): +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉinio** – Bruno Guy Claude Henry
rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto n-ro 6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970
Bank of China - Hunan Branch n-ro 593 1, Duan Furong Road (M) Changsha - Hunan - Ĉinio
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete: barthelemy.maurau@free.fr
**Germanio** – Gary Mickle
Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio
rete: gmickle@nexgo.de

**Hispanio** – Pedro María Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete: pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
**Hungario** – PETIK Janos (35623)
Hársfa u. 31. I/7
HU-3104 Salgótarján
retadreso: kitepsonaj@gmail.com
**Italio** – Nicola Ruggiero
Via Francesco Petrarca, 9
IT-10126 Torino (TO)
rete: nicolaruggiero1986@gmail.com
IBAN: IT05Z0347501605CC0011648125
SWIFT/BIC: INGBITD1
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete: b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Katalunlingvio** – Sandra Vives (KEA)
Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: sandra@esperanto.cat
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
4014-2202, 156, Gwangyomaeul-ro, Yeongtong-gu
KR-16510 Suwon-si, Gyeonggi-do
rete: paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
HR-21414 Gornji Humac (Otok Brac), Kroatio
Tel: +385.21.647.059, Poŝtel: +385.098.182.79.07
rete: ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Bankkonto: 3105505351 otpbanka
IBAN: HR51 2407 0003 1055 0535 1
BIC: OTPVHR2X
**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel.: +37068736457
rete: grazopul@yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
BIC/SWIFT: HABALT22, Swedbank
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete: llrespr@libero.it
IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
rete: cmranda@frisurf.no
**Portugalio** – PAZ Alexandra kaj PRIETO Roger
Joaquim Antonio de Aguiar 100, 1°
PT- 4000-309 PORTO
retadreso: alexandra.paz@gmail.com
retadreso: rogerprieto@gmail.com
Tel.: +351 916 793 285 / +351 915 067 954
Bankkonto: Caixa Geral de Depósitos
Konto: 0748007271900
IBAN: PT50003507480000727190049
BIC/SWIFT: CGDIPTPL

**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete: nikolao@yandex.ru
**Serbio** – Miomirka Kovačević
Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete: ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC: NDEASESS
**Svisio** – Dieter Rooke,
Interlakenstr. 122A, CH-3705 Faulensee.
rete: dieter.rooke@vtxmail.ch
tel:+41 62 396 01 86
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete: andreoespero@gmail.com
telefone: 380 67 99 470 03
**Usono** – Brandon SOWERS
PO Box 52731
GA-30355 Atlanta
rete: bsowers@protonmail.com
**Ĉiuj landoj** – SAT-Sidejo
67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj): financoj@satesperanto.org
Tel.: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

## KOTIZOJ 2022

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 8 € | Kongo, DR | 4 € |
| Aŭstralio | 48 € | Koreio | 36 € |
| Aŭstrio | 48 € | Kroatio | 16 € |
| Barato | 4 € | Kubo | 4 € |
| Belgio | 48 € | Latvio | 12 € |
| Bosnio-Herc. | 8 € | Litovio | 12 € |
| Brazilo | 16 € | Luksemburgio | 48 € |
| Britio | 48 € | Madagaskaro | 4 € |
| Bulgario | 8 € | Makedonio | 8 € |
| Ĉeĥio | 24 € | Malio | 4 € |
| Ĉinio | 8 € | Meksiko | 12 € |
| Danio | 48 € | Mongolio | 4 € |
| Estonio | 16 € | Nederlando | 48 € |
| Finnlando | 48 € | Nepalo | 4 € |
| Francio | 48 € | Norvegio | 48 € |
| Germanio | 48 € | Pollando | 16 € |
| Grekio | 8 € | Portugalio | 24 € |
| Haitio | 4 € | Rumanio | 12 € |
| Hispanio | 36 € | Rusio | 12 € |
| Hungario | 16 € | Serbio | 8 € |
| Irano | 8 € | Slovakio | 16 € |
| Irlando | 48 € | Slovenio | 16 € |
| Islando | 36 € | Svedio | 48 € |
| Israelo | 36 € | Svisio | 48 € |
| Italio | 44 € | Tajvano | 32 € |
| Japanio | 48 € | Turkio | 12 € |
| Kanado | 48 € | Ukrainio | 4 € |
| Kolombio | 8 € | Usono | 48 € |
| Kostariko | 12 € | | |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**

Por **Francio**, **Germanio**, **Hungario** kaj **Norvegio**, pagu al la SAT-konto en Parizo (vidu detalojn en "**Ĉiuj landoj**") sed nepre informu la peranton kaj la SAT-kasiston pri via pago.

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj.
> **Nura abono al *Sennaciulo*: 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.
> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.
> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.


*Sennaciulo*
Organe officiel de SAT / Oficiala organo de SAT

**Siège de SAT / Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Tel.:* (+33) 09 53 50 99 58
*Poŝtkonto:*
1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org


**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Vic-prezidanto:* Pedro Sanz
*Sekretario:* Brandon Sowers
*Kasisto:* Bruno Henry
*Vic-kasisto:* Alexandra Paz
*Ceteraj membroj:* Saioa Escobar, Paz (Jung Hyunsoo), Dominiko Simeone
*Reprezantoj de SAT en la LEA-Komitato:* Saioa Escobar, Paz
**Sennaciulo**
*Redaktoskipa kunordiganto:* Vinko Markovo
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* José Antonio del Barrio, Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcel Redoulez, José María Salguero (Kani), Richard Schneller kaj Franciska Toubale


*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al:*
SAT-Amikaro
132-134 boulevard Vincent Auriol
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 36 €
Autres pays/*aliaj landoj:* petu la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 25 G 86567

## REDAKTANGULO

Karaj legantoj,

Jen nova numero de *Sennaciulo* abunde provizita per reagoj kaj opini-artikoloj. Malĝojige, la aŭtoro de la unua el ili, Yves Nicolas, ne vidos ĝin, ĉar li mortis la 25an de oktobro 2022.

Kvankam la rilatado kun la nova presejo nun kontentige funkcias, la paperaj versioj de numeroj 3-4 kaj 5-6 bedaŭrinde ŝajne ne trafis ĉiujn legantojn, kun aparte gravaj ricev-problemoj por loĝantoj de Francio. Sed aldone al tiuj malfacilaĵoj ligitaj al misfunkciado de la franca poŝto, necesas konfesi, ke la redakteja kunordigado estas malpli efika lastatempe. Ja Pedro Sanz rezignis pri tiurilataj funkcioj. Li nun koncentriĝas al plusendo de la materialo ricevita en la redakteja adreso, rilatado kun la presejo kaj dissendo de la reta versio de la gazeto. Gary Mickle transprenis parton el la laboro rilata al antaŭpreparo de kontribuoj kaj korespondado kun aŭtoroj, sed pri aliaj taskoj ankoraŭ restas organizenda nova dispartigo inter la anoj de la redaktoskipo, kiu cetere tre bonvenigus freŝajn laborfortojn.

En tiu ĉi numero aperas kelkaj informoj pri la venonta SAT-kongreso, interalie ligo al la reta aliĝilo kaj al la programo, kiu ankaŭ dependos de viaj proponoj.

Fine, ni invitas vin atente legi la komunikon de la PK (p. 27) kaj pripensi vian eventualan kandidatiĝon. SAT bezonas vin.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

**Frontpaĝa bildo:**

foto de la kastelo Greziljono, kie okazos la 96a SAT-kongreso (18-25/7/2023). Foto de Thomas Pusch el Vikipedio.

# Enhavo

Enhavo


### Opinioj - reagoj

4 Pri la artikolo « Belorusio »
4 Kiel vi, ĉu estas je vi ankaŭ krizo !
5 Kiel USSR plibonigis la vivon de laboristoj en Okcidento kaj savis kapitalismon
7 « Kantanta la malbonon ĉe ties genero » (Saint-John Perse)
10 Pri busoj kaj moraloj !

### Tra la mondo : Eŭropo

12 Sindikatanoj prizonkondamnitaj en Hispanio
13 NATO, multekosta hipokriteco
13 Novfaŝistoj en la centro de Eŭropo
14 Parolu ni pri faŝismo

### Tra la mondo : Mezoriento

15 Erdoğan silentigis la liberan gazetaron
17 La PDK “perfidis” la kurdojn
18 “La akuzo kontraŭ la ĵurnalistoj estas politika”

### Tra la mondo : Azio

20 Japanoj tra la japanio protestas ŝtatan funebron por unu el la plej reakciaj ĉefministroj
21 Prelego de junulo Kamoŝita Mataki pri sia vivo post la nuklea akcidento
23 La Supera Juĝejo verdiktis malfavore al la viktimoj de la nuklea akcidento

### Nekrologo

25 René Geivaerts (1932-2020)

### SAT-anoj aktivas

26 Ni planas seriajn kunvenojn por kaj per Esperanto en Sapporo, Japanio
27 SAT-kunsido en Japanio

### El la SAT-administrejo

27 Helpfonduso por kongresanoj
27 Voko al kandidatiĝoj por la nova PK (agadperiodo 2024-2027)
28 Pri kongresa programo kaj ekskursoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*

**sennaciulo.redaktejo@gmail.com**

# Pri la artikolo « Belorusio »

## (aperinta septembre de 2022 en Sennaciulo de Novembro-Decembro 2021)

*Sennaciulo* aperigis senkomentan tradukon de artikolo el organo de Hungaria Laborista Partio en Aŭgusto 2021, kies enhavo konsistas en senkondiĉa subteno al Lukaŝenko, prezidanto de Belorusio, Heroo de la senriproĉa batalo kontraŭ NATO, subtenata de la tuta belorusa popolo, kiu laŭdire amegas sian Ĉefon. Bedaŭrinde, la tradukinto, Janos Petik (SAT-ano, 35623) el Hungario, ne kunligis komentojn kaj informojn por la legantoj. Oni scias nenion pri tiu videble ortodoksa komunista partio el Hungario, el kiom da membroj ĝi konsistas, kiam ĝi estis kreita, kiun influon ĝi ĝuas sur la politika tutlanda tereno. Oni ne scias ĉu la aŭtoro (aŭ tradukisto el la belorusa?) de tiu originala artikolo estas beloruso el Hungario aŭ el Belorusio mem.

Oni ne scias kial Petik proponis tiun artikolon al *Sennaciulo*. Ĉu por denunci la influon de NATO en Orienta Eŭropo pere de ĝisosta subteno al la prezidanto Lukaŝenko kaj tiel plifortigi ankaŭ la voĉon de la nuna kaj iel ribelema hungara registaro en Eŭropa Unio?

Sed mi preferus pensi, ke Janos Petik volis amuzi nin per tutkliŝa laŭdaro al la ĉefgvidanto de komunistoj, kiujn mi kredis jam mortaj de pluraj jardekoj.

La argumentoj kontraŭ la deziro de NATO pligrandigi sian influon en Eŭropo ne estas kontesteblaj kaj multaj anoj de nia movado probable memoras kaj malaprobas la fiagojn kaj mispaŝojn de NATO kaj Usono en multaj landoj kaj dum pluraj jardekoj. Tiu influo cetere grandiĝis ekde la komenco de la nuna milito inter Rusio kaj Ukrainio kaj meritus aktualigitan analizon.

Mi konfesas mian malkapablon fajne analizi la situacion en Belorusio, ĉar miaj informoj venas nur de la okcidenta flanko, sed mi tamen kredas la informojn, ke multaj belorusoj devis forfuĝi aŭ estis arestitaj kaj subpremataj nur pro tio, ke ili postulas de sia registaro pli da libereco kaj la rajton sin organizi laŭvole en kritikemaj partioj, sindikatoj ktp.

Mian konvinkon absolute fortigas la stilo de la artikolo tradukita de Janos Petik, kie Lukaŝenko aperas kiel ĉiokapabla kaj ĉieestanta prezidanto. Oni kredas legi tekstojn je la honoro de Stalin aŭ de Mao kun vortoj plenfloraj kaj adoremaj al la Granda Ĉefo. Sed ĉiam sin kaŝas malantaŭ tiaj vortoj teruraj masakroj kaj tuta popolo sub la jugo de sistemo laŭdire komunista aŭ ekskomunista sed kie regas fakte sovaĝa (ŝtat-)kapitalismo kun klanoj, familiaj mafioj kun granda malegaleco inter la plej riĉaj kaj la ordinaraj homoj.

Yves NICOLAS (SAT-ano, 32982)

# Kiel vi, ĉu estas je vi ankaŭ krizo?

Estas milito! Ne barbara milito kiel ni en Eŭropo konas kun bomboj kaj grenadoj, sed milito, kiu kondukas homojn al malsato. Mi parolas nun nur pri Belgio, ĉar kio estas en aliaj landoj mi ne scias. Mi aŭdis nun kaj antaŭe pri aliaj landoj, sed mi ne scias ĉu tie la popolo estas vere en la stato de malriĉo.

Belgio iam estis unu de la plej riĉaj landoj kiujn mi konas, sed nun mi aŭdas nur zorgojn kaj turmentojn. La politikistoj diras ke ĉio venas de la milito, kiu okazas inter Ukrainio kaj Ruslando. Sed estas tiom multaj militoj kiuj okazas en la mondo. 'Oni' diras ke estas ĉar Putin, tiu estas la prezidento de Ruslando, nuligis la sendadon de gaso tra la naftodukto, kiu iras de Ruslando tra Ukrainio rekte al Germanio.

Bone, mi povas kompreni ke Putin, same kiel la aliaj oligarkoj, decidas ke Eŭropo kondutas maldece kun lia lando kaj tial ne sendas gason. Sed li sendas gason al Germanio kaj ne al Belgio. Jes, mi scias ke NATO estas ĉe ni...

O jes, tion vi devas scii, la NATO antaŭe estis en Francio sed la prezidento De Gaulle ne plu volis ĝin en sia lando kaj tial ili translokigis la sidejon de NATO al Belgio.

Bone, do Belgio havas NATO-n, sed la popoloj nenion volas de NATO kaj preferas ke ili foriru, kial ne al la lando

kiuj ne havas armeon, al Svislando. Mi persone pensas ke NATO devas esti en la lando kiu ne havas regulan armeon. Aŭskultu, Svislando estas "la trezorejo de la demokrata mondo" kaj ĉu estas iu kiu povas pli bone gardi tiun ol NATO. Estas kvazaŭ mono kiu protektas monon.

Fakte kio estas la problemo nun? Pro iu kialo Putin nuligas sendadon de gaso al Germanio. Tial oni diras ke la prezo de gaso estas dum unu jaro x 300. Antaŭe ni pagis ekzemple €100 kaj nun oni pagas €3800 jare, aŭ multe pli, evidente, se la domo ne havas protekton kontraŭ malbona vetero aŭ simile.

Mi ne volas paroli pri elektro nun ĉar la firmaoj estas ĉiuj krimuloj. La produktprezo restas la sama, sed ili altigas tamen la vendprezoj x 100. Pardonu estas por la gajno!

En la jaro 1985 estis en Belgio 500.000 homoj kiuj vivis sub nivelo de malriĉeco. En la jaroj 2022 oni parolas pri pli ol 1.000.000 da homoj. Inter 10 infanoj estas 2 infanoj kiuj, kiam ili iras al lernejoj, ne havas buterpanon aŭ ion similan en sia sako por manĝi.

En la parlamento oni daŭrigas paroli pri "bovo kaj bovido" kvazaŭ okazis nenio en Belgio. Sed ili havas grandan salajron (pli ol €6000 monate por parlamentanoj kaj pli ol €10.000 por ĉefministroj (ni havas 5 ĉefministrojn).

En programo de TV oni diras ke sindikatoj parolas pri nacia striko la 9-an de novembro, ĉar la homoj ne plu povas elteni la krizon kiun nun ni travivas. Oni demandis al homoj de PVDA (estas la marksista partio en Belgio), ĉu estas vera momento por striki. Evidente ĝi estas! Ili estas la sola partio kiu parolas pri la homoj. Ilia salajro estas limigita je €3000 monate.

Estas nur unu granda problemo. Belgio kaj precipe Flandrio estas ege, ege naciista. Ili voĉdonas por Vlaams Belang kaj N-VA. Feliĉe ĝis nun la du partioj parolas apenaŭ unu kun alia, sed tio povas ŝanĝiĝi kaj tiam ili havos la plej multon de voĉoj.

Estas krizo en Belgio. Estas krizo kiun mi neniam spertis. La riĉuloj iĝis pli riĉaj kaj la normalaj homoj estas iliaj viktimoj. Homoj devas pli kaj pli preni duan laboron kaj homoj kiuj estas pensiuloj devas bone konsideri por kio ili donas sian monon.

La libera merkato kiun Thatcher kaj Reagan propagandis kiel 'la ĉielo sur tero' montriĝas infero.

Jakvo

# Kiel USSR plibonigis la vivon de laboristoj en Okcidento kaj savis kapitalismon

En la 1950-aj, 60-aj, 70-aj jaroj, ni ofte emis diri "Baf! Kapitalismo ne estas tiel malbona" kaj "kapitalismo kun homa vizaĝo devas esti ebla", ktp, sed ĝi estis iluzio, ĉar tio, kion ni havis antaŭ niaj okuloj, **ne estis la vera vizaĝo** de kapitalismo; ĝi estis ia historia kompromisa frukto de konflikt-ekvilibro. En tiu tempo NATO konkludis, ke ĝia intereso estas fari el Okcidenta Eŭropo montrofenestron fronte al Sovetunio (kiel la fama jugoslavia kinoreĝisoro Emir Kusturica diris en filmeto: https://www.dailymotion.com/video/x5u3bfq ), unue pri liberoj kaj respekto al homaj personoj: do ili respektis (aŭ almenaŭ tion ŝajnigis) la regulojn de juro, demokratio (almenaŭ formala demokratio), la publikajn liberecojn, la esprimliberecon, kaj faris sociajn reformojn, eĉ sen esti devigataj, kaj ĉiuj, inkluzive la dekstrajn partiojn, konsideris ŝtatigadojn, publikajn servojn, socialan sekurecon, esti aĵoj *normalaj*, pensis, ke tio eĉ ne estas politika, sed evidenta, simple la naturo de "la moderniĝo", "la Progreso". Sed post kiam Sovetunio falis, ili pensis al si: "ni ne plu bezonas nin ĝeni!" Kaj fakte la vera vizaĝo de moderna kapitalismo estas la policistaĉa, manipulema, senhonta, komputiligita kaj totalisma, senfine avida, kaj koruptita, kiun ni havas nun! Jen ĝia vera vizaĝo! [1]

Kiel iam diris en televidelsendo la franclingva egipta verkisto Albert Cossery: "Ne ekzistas progreso de la homaro – stultaĵoj ĉio ĉi! – la homoj nunaj estas la samaj kiel tiuj de antaŭ